

Johann Wolfgang von Goethe,      Johann Wolfgang von Goethe,      Johann Wolfgang von Goethe,

Trovaĵo

Trovita

Gefunden

*tradukita de Richard Schulz*      *tradukita de Antoni Grabowski*

Mi vagis sola  
En la arbar'.  
Nenion serĉi  
Jen mia far'.

Mi foje arbaron  
Promene eniris,  
Kaj serĉi nenion  
En penso deziris.

Ich ging im Walde  
So für mich hin,  
Und nichts zu suchen,  
Das war mein Sinn.

Enombre vidis  
Floreton mi.  
Lumanta stelo,  
Okulvizi'.

Mi vidis, en ombro  
Jen staras floreto:  
Steleto lumanta  
Aŭ blu-okuleto.

Im Schatten sah ich  
Ein Blümchen stehn,  
Wie Sterne leuchtend,  
Wie Äuglein schön.

Al mi plukonta  
Jen ĝia vort':  
„Ĉu ke mi velku  
Al frua mort' ?“

Mi volis ĝin ŝiri,  
Sed plore ĝi diras:  
“Ĉu por ke mi velku,  
Vi tial min ŝiras?”

Ich wollt' es brechen,  
Da sagt' es fein:  
„Soll ich zum Welken  
Gebrochen sein?“

Mi ĝin elfosis  
Kun la radik'  
Ĝin portis domon  
Al la larik'.

Do mi ĝin elfosis  
Kun radikareto,  
Kaj portis al mia  
Ĝarden' ĉe l' dometo.

Ich grub's mit allen  
Den Würzlein aus,  
Zum Garten trug ich's,  
Am hübschen Haus.

Replantis tie  
Ĝin en la fru'.  
Ĝi nun kreskadas  
Kaj floras plu.

En loko trankvila  
Plantite karese,  
Ĝi kreskas, burĝonas,  
Kaj floras senĉese.

Und pflanzt' es wieder  
Am stillen Ort;  
Nun zweigt es immer  
Und blüht so fort.

...

...

...

*Traduko de la Germana poemo "Gefunden" de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (\*1749-08-28 - †1832-03-22) en Esperanton de RICHARD SCHULZ (Rikardo Ŝulco, \*1906-07-12 - †1997-09-26) en 1984-07.*

*Arg-376-740 (2013-02-26 15:17:50)*

*Tiu ĉi poem-esperantigo aperis en la n-ro 61 (1984/7) de la Vestfaliaj Flugfolioj“, kiujn eldonis Richard Schulz, kiu loĝis tiutempo en la germana urbo Mindeno (Minden). Pri Richard Schulz vidu la vikipedian retejon [http://de.wikipedia.org/wiki/Richard\\_Schulz](http://de.wikipedia.org/wiki/Richard_Schulz).*

*Traduko de la Germana poemo "Gefunden" de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (\*1749-08-28 - †1832-03-22) en Esperanton de ANTONI GRABOWSKI (\*1857-06-11 - †1921-07-04).*

*Arg-376-741 (2006-12-14 00:07:48)*

*Mi, Manfred Retzlaff, trovis tiun ĉi traduk-version en la interreto, en la retejo de s-ano Don Harlow, en <http://donh.best.vuh.net/Esperanto/Literaturo/Poezio/parnaso/>, precize sub <http://donh.best.vuh.net/Esperanto/iteraturo/Poezio/parnaso/trovita.html>.*

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (\*1749-08-28 - †1832-03-22).*

*Arg-376-738 (2006-12-11 22:11:49)*